# Eŭropa Bulteno

**Sendependa esperantlingva ret-bulteno**
**por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo**

21an de aŭgusto de 2000. N-ro 8

Redaktas:
Umberto Broccatelli - Prezidanto de Euxropa Esperanto-Unio
Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio
u.broccatelli@tiscalinet.it, tel./fakso +39-0687135019

"Esperi pri dauxrado de harmonio inter multaj sxtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazajxoj kaj kontrauxiri la sperton akumulitan de la tempo" Hamilton, The Federalist

* * * * * * *

Tiu cxi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri Euxropa Esperanto-Unio (EEU-informilo) kaj pri la euxropa agado de la Esperanto-movado gxenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de euxropa unuigxo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (Euxropa debato). Kiu deziras ricevi gxin, tiu sin anoncu al la ret-adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>; same se oni ne plu deziras ricevi gxin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

## EEU - INFORMILO

### AGADO POR LA KONSTANTA KONFERENCO PRI LINGVOJ

#### De Francio

Pri la kampanjo por K.K., mi precizigas, ke mi jam ricevis plurajn subskribojn de francaj E.P., kaj ke la kampanjo al la francaj deputitoj kaj kleruloj estas nun okazanta pere de niaj regionaj federacioj kaj lokaj kluboj. Mi petis resendon de la subskribitaĵoj antaŭ la 15-a de decembro, kaj tiam decidos kun Gérard Caudron la plej efikan rimedon por resendi ilin al la plej kompetenta kaj plej atentema Eŭropa Instanco. (Claude Longue Epée, EEU-komitatano por Francio)

#### De Svedio

Kun plezuro mi povas informi vin, ke la jarkongreso de Sveda Esperanto Federacio, kiu okazis la 20-an kaj 21-an de majo en Helsingborg unuanime akceptis rezolucion por konstanta konferenco..., ege simila al la Ostenda. Ni nur forstrekis la tri vortojn "kiel estas dezirinde", por ke ĝi estu

unuanima. (Bengt Nordlöf, EEU-komitatano por Svcedio)

## De Italio

Ni skribis al ĉiuj EP-anoj italaj. Ĝis nun ni ricevis aliĝojn de ses eŭrodeputitoj (Massimo CARRARO, Antonio DI PIETRO, Enrico FERRI, Mario MANTOVANI, Pasqualina NAPOLETANO, Gianni VATTIMO) kaj de ses universitataj profesoroj. (Umberto Broccatelli, EEU-komitatano por Italio)

## ĈU EEU-OFICEJO EN BRUSELO?

La ideo pri EEU-oficejo en Bruselo, por havi kostantan kontakton kun la EU-instancoj kaj la ĵurnalistoj laborantaj en la ''Eŭrop-Unia Ĉefurbo'', estis vaste diskutata per reto post la Ostenda kongreso. En aŭtuno okazos en Roterdamo kunveno por funde trakti la tamon kaj alveni al konkretaj decidoj.

## 2001 EŬROPA JARO DE LA LINGVOJ

Anna RITAMÄKI <aritamak@ra.abo.fi> estas taskita de EEU pri laEŭropa Jaro de la lingvoj.

## LA ĈARTO DE LA FUNDAMENTAJ RAJTOJ DE LA UNIO

En Italio okazis kunsido de la senata kaj la deputitĉambra komisionoj pri eŭrop-uniaj aferoj kun la temo "Preparado de la ĉarto de la fundamentaj rajtoj de la eŭropa unio", en kiu reprezentantoj de diversaj organizaĵoj de la socio estis aŭskultataj. Inter ili, kiel reprezentanto de EEU kaj de IEF, estis Umberto Broccatelli, kies intervenon ni donas esperantigitan ĉi-sekve el la senata protokolo.

Senato de la Respubliko p. 25-26 XIII Leĝfara periodo

## SENATA KOMISIONO PRI EEK KAJ XIV DEPUTITĈAMBRA KOMISIONO KUNE SIDANTAJ 5A STENOGRAFIA PROTOKOLO (25an de julio 2000)

BROCCATELLI. Sinjoro Prezidanto, mi dankas Vin pro tio ke Vi donis al mi la eblecon mallonge interveni. Mi estas prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio kaj reprezentas la prezidanton de Itala Esperanto-Federacio.

Advokato Martini referencis al la Ĉarto de la rajtoj de la minoritataj regionaj lingvoj, plendante pro tio, ke pri ĝi ne ekzistas mencio en la Ĉarto de la Rajtoj. Oni ankaŭ demandis, kiun kunligeblecon tiu Ĉarto eventuale povus havi kun la Ĉarto de la Rajtoj. Al mi ŝajnas ke la kunligebleco povus troviĝi tie kie oni parolas pri nediskriminado laŭ sekso, laŭ nacieco aŭ laŭ lingvo. Nome oni eble devus pli bone eksplicitigi, kiamaniere tiajn diskriminadojn oni evitu.

Mi volus tamen emfazi ke, dum oni prave zorgas protekti la regionajn kaj minoritatajn lingvojn kontraŭ la hegemonio de la naciaj lingvoj, oni ne donas sufiĉan atenton al la fakto, ke ankaŭ la grandaj naciaj lingvoj, pri kiuj ni fieras, estas minacataj de la hegemonio de aliaj lingvoj ludantaj rolon mondskalan. Mi aludas, kompreneble, al la angla lingvo. De tempo al tempo leviĝas voĉoj, en la kampoj de kulturo kaj de politiko, maltrankvile zorgaj pri la sorto al kiu iras lingvoj kiel la franca aŭ la itala, kiuj ŝajnas neeviteble destinitaj roli duarangan rolon aŭ, je longa tempdistanco, en la daŭro de kelkaj generacioj, suferi la saman sorton, kiun suferis en la antikvaj tempoj la lingvo etruska antaŭ la latina. Tiuj zorgoj, tamen, ne

kuniĝas al konkretaj proponoj pri efikaj solvoj, kiuj unuflanke prikalkulu pri la neceso de komuna "lingua franca", nome pri la intercivitana komunikado, aliflanke konsideru tamen la supre aluditajn danĝerojn, kiujn adopto de nacia lingvo por tia rolo kuntrenus.

Mi volus informi pri tio ke, por trovi validan solvon al tiu dilemo, oni prezentos al la Unio, ĉirkaŭ la fino de la nuna jaro, la proponon starigi Konstantan Konferencon pri la lingvoproblemo en Eŭropo, celantan esplori la diversajn eblajn opciojn, kun la respektivaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Inter tiuj eblaj opcioj troviĝas tiu proponata de planlingvo, specife de Esperanto; tiun opcion oni devas serioze esplori kaj taksi, kune kun la aliaj, surbaze de faktaj donitaĵoj kaj per helpo de spertuloj. Estus oportune, laŭ ni, ke en la Ĉarto de la fundamentaj Rajtoj de la Eŭropa Unio estu inkluzivita deklaro kiel la jena:

"La eŭropaj civitanoj devas ne suferi ian ajn diskriminadon, juran aŭ faktan, rilatan al sia aparteno al lingva grupo. La Unio kaj la Ŝtatoj devas prizorgi estigon de solvoj, kiuj ebligu al diverslingvaj civitanoj komuniki inter si sur nivelo de egaleco, sen diskriminadoj, nek pro etnaj nek pro soci-ekonomiaj kaŭzoj."

Surbaze de tio, oni povos trovi en la estonteco la plej validajn solvojn.

## PETSKRIBO DE LA ASOCIO "UnitéE" favore al komuna lingvo eŭropa.

En Francio la asocio "UnitéE" lanĉas petskribon al la Eŭropa Parlamento favore al decido pri elekto de unu komuna eŭropa lingvo. Tiu ĉi agado iras en la sama direkto kiel nia propono pri Konstanta Konferenco, nome ĝi emfazas la neceon ELEKTI Do ĝi estas subteninda. Oni turnu sin rekte al la adreso de la asocio.

## PETSKRIBO AL LA ATENTO DE LA EŬROPAJ PARLAMENTANOJ POR ADOPTO DE KOMUNA LINGVO EŬROPA

Sinjorinoj kaj sinjoroj eŭropaj deputitoj,

La konstruadon de Eŭropo oni volis tial, por ke nia kontinento ne plu estu la loko de la konfliktoj, kiuj disŝiris ĝin laŭlonge de ĝia tuta historio. La konstantaj progresoj al la unuiĝo estis eblaj tial ke ĉiuj Eŭropanoj kundividis la komunan sperton de unu aŭ de du mondmilitoj. Sed ju pli la eventoj malproksimiĝas en la pasinteco, des pli la intenseco de la sentoj naskitaj de travivita sperto ne plu povas esti la sama por la novaj generacioj.

Nuntempe la Eŭropanoj povas havi ekonomiajn, diplomatiajn aŭ militistajn interesojn konverĝajn. Sed tiuj interesoj estas pli la rezulto de la ekonomiaj fortoj, de la efikoj de la tutmondiĝo ol de volo vivi kune kaj havi komunan projekton, ĉar ili estas limigitaj de la interesoj de ĉiu unuopa nacio, ne konsistigas la fundamenton de solidareco iganta ke ĉiu pretu oferdoni ion por la alia.

Ni opinias ke, por doni al ĉiu Eŭropano la senton pri destinkomuneco, necesas doni al Eŭropo kulturan projekton, kiu ebligu al ĉiuj civitanoj rekoni sin unu en la alia. Sen tia projekto, Eŭropo limigos sin esti konstruaĵo taskita kiel eble plej bone mastrumi la pli-malpli diverĝajn

interesojn, same kiel povus fari iu ajn organizaĵo taskita aranĝi la liberan interŝanĝon - kiel la Monda Organizaĵo de Komerco - aŭ militista alianco - kiel NATO.

Por ke Eŭropo fariĝu io alia ol institucio mastrumanta grandan merkaton - kaj eble iam estonte komunan defendon - ni estas konvinkitaj ke necesas elekto de komuna lingvo, kiu estu la dua lingvo de ĉiu Eŭropano.

Tiu elekto estas necesa tial ke tiu komuna lingvo:

- ebligos al ĉiu civitano de la Unio rekte komuniki kun ĉiu ajn alia civitano, kio stas faktoro de libereco;

- protektos la kulturan diversecon kaj specife la lingvan diversecon: ĝuste la unueco protektas la diferencojn, dum ĝia foresto favoras la pli potencajn; aliflanke, la diverseco nutras sin per interŝanĝoj kaj komuna lingvo ebligos al ĉiu kulturo pli bone konigi sin ĉe la aliaj, kaj riĉigi la komunan riĉaĵon;

- evitos ŝarĝi la individuojn per la disprema pezo de defendado de tiu ĉi diverseco: multlingveco - kiu cetere ne estas neakordigebla kun tiu projekto
  - nepre havas siajn limojn, ne garantias ke ĉiu povu interparoli kiu ĉiu alia kaj ne metas ĉiujn lingvojn sur egalecan nivelon;

- ebligos, kune kun la gepatra lingvo, respondi al la duobla bezono je identeco kaj je universaleco: ĉiu civitano povos tial havi kulturon de sia proksimaĵo, tamen havante la eblecon malfermi sin al pli vasta spaco;

- donos al la eŭropa politika debato dimension proksiman al la civitanoj: ĉu povas ekzisti vera demokratio, se oni ne povas fari kolektivajn elektojn kaŭze de tio ke la debatoj estas disdividitaj laŭ lingvaj limoj, se la civitanoj ne povas rekte alparoli la politikistojn, nek rekte kompreni ilin, se humuro, esenca dimensio de diskutado, forestas?

Pro tiuj ĉi kialoj, ni petas al la eŭropa Parlamento bonvoli adopti rezolucion favore al procedo de elekto de komuna lingvo. Celante ebligi atingon de plej vasta konsento, tia procedo devos prezenti la plej eble vastan elekto-eblecon kaj kuninteresigi la civitanojn kaj iliajn reprezentantojn. Ĝi povus, ekzemple, esti la jena:

- starigo de plurnaciaj laborgrupoj, ĉiu el kiuj estu taskita pri unu lingvo-propono, startante de dokumento kiu difinu la kriteriojn de allasebleco de tiuj projektoj;

- prezentado de tiuj projektoj al la Eŭropa Parlamento kaj debato pri la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj de la diversaj eblaj solvoj (ekzistanta natura lingvo, jam ekzistanta kreita lingvo, nove kreota lingvo);

- voĉdonado per sinsekva eliminado, asociante la Naciajn Parlamentojn.

Tia projekto ne estas pli artefarita aŭ utopieca, se oni rigardas la instruojn de la historio, ol tiu pri pace konstruita politika unuiĝo. Ni kredas, male, ke ĝi igos pli kredinda la volon je politika unuiĝo.

Sinjorinoj, sinjoroj eŭropaj deputitoj, por redoni vivon al Eŭropo, por redoni deziron je Eŭropo, por ke ĝiaj civitanoj sentu sin partoprenantoj en ĝia konstruiĝo, ni petas ke Vi bonvolu konsideri nian proponon.

Antaŭdankante Vin, ni esprimas niajn plej eŭropajn sentojn,

Association UnitéE
3 bis, rue de l'Essai - 75005 PARIS
23, rue de Stalingrad - 92000 NANTERRE
Tel.: 0033 (0)1 55 43 86 97 / (0)1 47 25 41 32 / (0)6 81 63 68 86
Fax : 0033 (0)1 47 42 77 43
e-mail: mregnard@club-internet.fr / unitee@unitee.com

**KIEL ONI POVAS INDIVIDUE SUBTENI EEU**

Kiel konate, Eŭropa Esperanto-Unio estas kunordiga organizo el Landaj Esperanto-Asocioj en la kadro de Eŭropa Unio. Tamen individuoj, kiuj havas intereson pri ĝia agado, favoras ĝin kaj volas kontribui al ĝi kaj esti regule informataj pri ĝi, povas esprimi sian apogon aliĝante al la listo de la "Simpatiantoj de EEU". Tion oni povas fari sendante almenaŭ 20 eŭroj al la kasisto de EEU (s-ro Hans Ten Hagen, Middenweg 587 1704 BH HEERHUGOWAARD, Nederlando) pere de la UEA-konto eece-p. Simpatiantoj de EEU rajtas ricevi paperan version de Eŭropa Bulteno. Se oni ne deziras ricevi la paperan Bultenon (ĉar oni jam ricevas ĝin per e-poŝto), tiam sufiĉas kotizo de 10 eŭroj. Kompreneble pli altaj kontribuoj estos ĉiam bonvenaj.

*******

# EŬROPA DEBATO

En la pasinta numero ni citis ricevitan demandon: Ĉu esperantistoj estas por aŭ kontraŭ politika unuiĝo de Eŭropo? Kaj aldonis: Jen interesa demando. Kiu volas sciigi sian personan starpunkton ĉi-teme, mesaĝu al ni.

Pri tiu ĉi temo okazis interŝanĝo de ideoj inter Neil MacKilligin sekretario de la Esperanto-Partio de Britio <neil@e-p.org.uk> kaj Umberto Broccatelli.

UB: Mi ricevis pere de Interredaktore vian interesan "La balota Bulteno". Pri la programo de via Partio mi petas vin doni klaran respondon al la jena demando: - ĉu vi favoras politikan integriĝon de Eŭropo?

NMK: Dankon pro via enketo. Mi klopodos respondi viajn demandojn, sed mi devas emfazi ke la partio ankoraŭ ne havas manifeston kaj miaj respondoj estas de persona vidpunkto (kiun mi ne rajtos trudi al la partio). Do, unuope: Unuvorte, jes, sed la detaloj de tia integriĝo estas pridiskutendaj.

UB: En pli klaraj vortoj: ĉu vi favoras starigon de Eŭropa Federacio (Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo)?

NMK: Jes, sed mi preferas nomi min 'konfederalisto' ol 'federalisto'. En via lasta kontribuo al eŭropo-grupo vi priskribis la fondiĝon de Usono kaj ties federacian konstitucion - sen mencii la usonan civilmiliton kiun rekte kaŭzis la disputo inter federalismo kaj konfederalismo. La samo okazis antaŭnelonge en Jugoslavio. La ĉefa diferenco inter la du ismoj estas la rajto eliri la ŝtataron kaj sendependiĝi denove. - Suvereneco. Tiun rajton mi defendos. ( Noto: En tiu kontribuo UB klarigis ĉefe ke konfederacio estas "ligo de ŝtatoj" (germanlingve "Staatenbund"), kie la decidpovo restas finfine ĉe la unuopaj ŝtatoj, dum federacio estas ja ŝtato ("Bundesstaat") kun propraj

decidpovoj en la kampoj de ĝia kompetento, kaj ke kondiĉoj, por ke ekzistu vera federacio, estas libera konsento ĉe la aliĝo kaj demokratia sistemo.)

UB: Ĉu vi favoras kunvokon de Konstitucifara Asembleo de Eŭropa Unio por doni al la Unio Konstitucion, sur kiu baziĝu ĝia disvolviĝo, same kiel okazis ĉe la 13 nordamerikaj kolonioj, kiuj fariĝis Usono?

NMK: Jes, sed interkonsenti pli gravas ol kunsidi!  Kaj necesas memori ke, kvankam havinda, skribita konstitucio garantias nenion.

UB: Mi konscias ke en Britio tiaj ideoj ne estas tre popularaj. Sed mi ankaŭ memoras, ke la unuaj verkoj pri eŭropa federismo estis (antaŭ la dua mondmilito) ĝuste de britaj aŭtoroj (ekz. Lord Lothian, "Pacifism is not enough nor Patriottism either").

NMK: La vorto 'feder(al)ismo' estas neracie miskomprenata en Britio. Sed post la dua mondmilito ni britoj, kune kun la usonanoj, trudis ĝuste tiun sistemon al la venkitaj germanoj!  Se ĝi restas sufiĉe bona por ili, ĝi eble estus sufiĉe bona por ĉiuj eŭropanoj. Efektive, en la brita ŝtato ni jam havas specon de federacio (novaj parlamentoj en Skotlando, Kimrio kaj Norda Irlando, kaj jamaj parlamentoj en Manksinsulo kaj Normandaj Insuloj) sed tiun vorton, 'federacio', ni ne uzas! Pri la estonteco de Eŭropa Unio mi esperas ke ĝi evoluos laŭ la konfederacia modelo kun la rajto de secesio. Mi persone neniam (libervole) enirus domon el kiu mi ne rajtus eliri!  Eŭropa Unio estu kibuco, ne prizono! Sed tion dirinte, mi esperas ke nia kibuco estos feliĉa kaj unueca, kaj ke neniu kibucano sentos sin malkomforte tie.

UB: Se konfederacio havos registaron kompetentan pri difinitaj ĉefaj kampoj, tiam ĝi estos federacio, eĉ se ĝi havos alian nomon (kiel Svislando). Pri ebleco de secesio: mi ĉiam estas kontraŭ disdividiĝo kaj disfalo de demokrataj ŝtatoj (Sovetio kaj Jugoslavio ne estis tiaj). Sola pravigo al secesio povus esti, miaopinie, maldemokratiĝo de la centra registaro. La motivo de mia starpunkto estas tio, ke mi vidas kiom malfacile estas PACE kaj KONSENTE unuigi diversajn landojn (tio preskaŭ (?) neniam okazis en la historio) kaj do tian unuecon oni devas ĵaluze gardi, ĉar starigo de landlimoj, kiuj antaŭe ne ekzistis, pliigas la riskojn de malpacoj. Sed eble mi estas tro pesimista. Kompreneble oni rajtas havi aliajn vidpunktojn. Mi esperas ke la evoluo de Eŭropa Unio igos ĝiajn popolojn pli bonfartaj, pli amikaj inter si, pli konsciaj pri la komuneco de iliaj destinoj. Kaj per tio mi ŝajnas al mi ke ni povas konkludi nian interesan ide-interŝanĝon.